



Balenido

Lundo, la 4-a de julio 2016

N-ro 3

Konatiĝu: Ilona Koutny

Ilona Koutny gvidos dum BET-52 kurson pri Esperanto en interkultura komunikado.

Ilona Koutny naskiĝis kaj edukiĝis en Hungario; ekde 1997 ŝi vivas en Pollando.

Diplomiĝis pri matematiko, franca filologio kaj esperantologio, poste doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (Hungario) kaj habilitiĝis ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando). Esperanto estas parto de ŝia profesia kaj privata vivo dum jardekoj. Lingvoj, komunikado kaj matematiko interesis ŝin dekomence, tial ŝi lernis kelkajn lingvojn kaj longe okupiĝis pri komputa lingvistiko.

Ŝi instruis dum jardeko ĉe la Esperanto-fako de Eötvös Universitato, kiel posteulo de prof. Szerdahelyi, krome aplikatan kaj komputan lingvistikon. Nun ŝi estas profesoro en UAM kaj estras la Ugro-Finnan Katedron. Ŝi fondis en 1998 kaj gvidas ankaŭ la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn ĉe UAM, kie ŝi prelegadas pri internacia kaj interkultura komunikado, Esperanta lingvistiko kaj metodiko. Okupiĝas ankaŭ pri la rilatoj de lingvo kaj kulturo, pragmatiko kaj leksikografio. Membro de la Akademio de Esperanto (1998-2016), profesoro de AIS.

Ŝi prelegis pri fakaj temoj en diversaj konferencoj, gvidis kursojn (ekzemple, ĉe la usona NASK) kaj verkis artikolojn en diversaj lingvoj, pretigis kelkajn vortarojn (Hungara-Esperanta meza vortaro kun I. Szerdahelyi, trilingvajn laŭtemajn etvortarojn).

Internacia elektokomisiono proklamis ŝin la Esperantisto de la Jaro 2008.

Kadre de BET-52 Ilona Koutny prezentos minikurson "Esperanto en interkultura komunikado": kvar prelegoj pri lingvo, kulturo kaj instruado en interaga maniero kun diskutoj. ▽



Programo


La 5-a de julio (mardo)

- 08.00 – 09.00 Matenmanĝo (Manĝejo)
- 09.00 – 10.00 **Somera Universitato.** Prof. Aloyzas Gudavičius: Prelegciklo pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (Ĉefsalono)
- 09.00 – 10.00 **Somera Universitato.** Prof. Ilona Koutny: "Esperanto en internacia komunikado" en salono de la gastejo "Birŝtono tulpé" (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo)
- 09.00 – 10.00 **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29).
- 10.00 – 10.45 **Somera Universitato.** Prof. Walter Ŝelazny: Prelegserio pri bazaj elementoj de judaismo (Ĉefsalono)
- 10.45 – 12.15 **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29).
- 11.00 – 10.45 **Somera Universitato.** Prof. Walter Ŝelazny: Prelegserio pri bazaj elementoj de judaismo (Ĉefsalono)
- 12.00 – 12.45 **Somera Universitato.** Anna Striganova: Rusaj fabeloj, en "Birŝtono tulpé" (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo).
- 12.00 – 12.45 **Somera Universitato.** Prof. Aleksandr Melnikov: Lingva reflektiĝo de specifa Esperanto-kulturo en Esperanto-publicistiko (Ĉefsalono)
- 13.00 – 14.00 **Tagmanĝo** (Manĝejo)
- 14.30 – 15.15 **Somera Universitato.** Prof. Ilona Koutny: Mondo, lingvo kaj vortaro (Ĉefsalono)
- 14.30 – 15.15 **Somera Universitato.** Maria Pokrzywnicka: Pri kaj por Esperanto. Internacia lingvo en populariga agado de la Etnografia Muzeo en Toruń (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo)
- 16.00 – 17.00 **Romkatolika meso en Esperanto.** Gvidas pastro Valerijus Rudzinskas (Preĝejo).
- 17.00 – 18.00 **Koncerto.** Mikaelo Bronŝtejn: Recitalo "Pekaj kantoj" (Ĉefsalono)
- 18.00 – 19.00 **Vespermanĝo** (Manĝejo)
- 20.00 – 21.00 **Koncerto de JoMo** (Kurhauzo)

- ▷ 1. Esperantlingva bildo de la mondo levos la demandon pri la rilato inter lingvo kaj pensado, ĉu esperantistoj havas similan lingvan bildon de la mondo, kaj surbaze de esploro provas doni interesajn respondojn.
2. Esperanto en interkultura komunikado prezentos Esperanton kiel ponton inter diversaj kulturoj, serĉos elementojn de komunaj normoj lingvaj kaj konduktaj, komparos la rolon de Esperanto en interkultura komunikado kun tiu de la angla.
3. Esperanto en internacia komunikado traktos la strebojn uzi Esperanton en internacia komunikado (efikeco, egaleco, kostoj), ĉefe en eŭropa kunteksto; ankaŭ la eblecojn de oficiala instruado de Esperanto en diversaj niveloj.
4. Ĉu facila lingvo facile lerneblas? analizos Esperanton el la vidpunkto de lingva komplekseco ĝenerale kaj kompare kun la gepatra lingvo de la lernanto, ankaŭ ĝian rolon en la lingva konsciigo kaj lernfaciligado por aliaj lingvoj.

(La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/2016/04/bet-42>)

Aloyzas Gudavičius



Profesoro Aloyzas Gudavičius gvidos kurson de la litovaj lingvo kaj kulturo. Kursanoj estos konatigitaj kun fundamentoj de la litovaj fonetiko kaj gramatiko, povos ellerni bazajn litovajn vortojn kaj la plej oftajn ĉiutagajn esprimojn. Samtempe oni priparolos la plej gravajn trajtojn de la litovaj historio kaj kulturo.

Profesoro Gudavičius naskiĝis en 1940. Li doktoriĝis en 1970 kaj habilitiĝis en 1990. Dum 1991-1997 li estis rektoro de la Šiauliai-a Universitato, kaj dum 1998-2007 – prezidanto de la universitata senato. Liaj ĉefaj lingvistikaj esplorkampoj estas semantiko kaj etnolingvistiko. Pri koncernaj problemoj publikigis multajn artikolojn en litovaj kaj eksterlandaj sciencaj eldonaĵoj, inkluzive de tri monografioj “Kompara semantiko de la litova kaj rusa lingvoj” (1985, en la rusa), “Etnolingvistiko” (2000, 2009, en la litova), “Kompara semantiko” (2007, en la litova). En 2012-2014 prof. Gudavičius gvidis la sciencan projekton pri koncepta metaforologio, kies ĉefa rezulto estis vortaro de konceptaj metaforoj en publika diskurso (2014). Ekde 1994 li estas organizanto de internaciaj konferencoj “Mondaspekto en la lingvo” kaj ĉefredaktoro de la scienca revuo “Filologija”. Nun li laboras kiel profesoro en la katedro pri fremdaj lingvoj, instruas kurson de etnolingvistiko kaj praktikan kurson de la pola lingvo. En 2012 li iĝis Honora Civitano de la urbo Šiauliai.

Aloyzas Gudavičius lernis Esperanton en la studenta aĝo kaj partoprenis en BET-oj kaj aliaj esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj. Dum pluraj jaroj li estis vizprezidanto de Litova Esperanto-Asocio. Kelkfoje li gvidis liberelektatan kurson pri interlingvistiko en magistrigaj filologiaj studprogramoj. En 2002 aperis lia litovlingva libro “Enkonduko en interlingvistikon” por studentoj kaj por pli vasta rondo de interesiĝantoj. En 2005 li estis rektoro de Internacia Kongresa Universitato dum la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno. En 2009 prof. Gudavičius ricevis la internacian premion *Academicus Ariste* pro interlingvistikaj meritoj.

(La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/2015/12/bet-21/>)

JoMo koncertos

Jean-Marc Leclercq, kiu en Esperantujo estas pli konata kiel JoMo kaj lastatempe kiel jOmO, komencis muziki en 1977 kaj eklernis Esperanton en 1988. Tute nature li do decidis kanti kaj verki en la lingvo internacia. Li surpiedigis sian propran tiaman grupon La Rozmariaj Beboj, kiu konatiĝis komence de la jaroj 1990-aj en la franca alternativa rok-medio. La grupo turneis en diversaj landoj (ankaŭ en Ĉinio), produkis du albumojn kaj eĉ koncertis sur la scenejo de la fama Pariza salono Olympia.

Post disiĝo de la Beboj, jOmO kreis la novan grupon Liberecanoj, kun kiu li surbendigis septitolan liberecaneman albumon ĉe Vinilkosmo kaj kreis la unuan rekordon de multlingva koncerto (22 kanzonoj en 22 lingvoj), kiu aperis en 2000 en la libro Guinness.

Poste kaj sole li surbendigis en la novaj studioj de Vinilkosmo tute Esperantan albumon *jOmO friponas*, kiu aperis fine de 2001. La sekva disko *jOmO slavumas* aperis printempe 2006 kun multaj muzikistoj slavstilaj, kun kiuj jOmO kunludas. Baldaŭ aperos albumo dediĉita al tradicia okcitana muziko kun tradicia instrumento “budego”, kiu estas ŝalmsako de Lengadoko. jOmO koncertis kun tuta grupo da budegoj en la 100-a Universala Kongreso en Lille (2015).



Li daŭre koncertas Esperante kaj multlingve, sola kun gitaro, kantante ĝojajn kaj dancigajn kantojn. Uzante pedalon de sonbukloj, kiu helpas lin aldoni gitarsolojn, basgitarnotojn kaj drumritmojn.

Li okupiĝas ne nur pri muziko. Ekzemple li eldonis ĉe franca eldonfirmao konversacilibron pri la gaskona lingvo, en kiu li ankaŭ verkas. En majo 2006 aperis lia unua romano *Ukrainio* en la okcitana lingvo, pro kiu li ricevis literaturan premion. En 2012 li aperigis rimvortaron de la okcitana. Li nun estas verkanta lernolibron de la okcitana por esperantistoj. Krom tio li havas polan edzinon, deknaŭjaran filinon, ne fumas, ne trinkas alkoholon, ne manĝas viandon, sed havas unu malvirton: li multe parolas :-).

(La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/2015/11/bet-16/>)

Pri la historio de Birŝtonas

La unua kuracejo en Birŝtonas estas konstruita en 1855, kaj en la sesa jardeko de la 19-a jarcento Birŝtonas jam estis vaste konata kiel banoterapia loko. Sojle de la Unua Mondmilito en la kuracejoj funkciis 72 banujoj, estis konstruitaj tri hoteloj. Birŝtonas tre suferis pro la milito, kaj al la juna, ĵus fondita ŝtato mankis rimedoj por rekonstruado kaj mastrumado de la banloko. Tamen la solvo estis trovita – Litovia Ruĝa Kruco en 1924 subskribis kontrakton kun Departemento de la Sano kaj devontigis sin modernigi la banlokon, instali ŝlimbanujojn, akvodukton kaj kanalizacion, instali elektran lumon. La estraro de Ruĝa Kruco promesis investi la tutan profiton al evoluigo kaj mastrumado de la banloko.

Precipe signifa evento estis komenco de kuracado per ŝlimo. La ŝlimaj kuracejoj kun emblemoj de la Ruĝa Kruco estis konstruitaj en 1927. Ĉi tiu konstruaĵo konserviĝis ĝis hodiaŭ.


Dum la Dua Mondmilito Birŝtonas vegetis, tamen ĝi evitis grandajn malfeliĉojn, kaj tuj post la milito ĝi ekfunkciis kiel kuracurbeto.

En Birŝtonas ankaŭ nun funkcias unu el la plej malnovaj litoviaj entreprenoj por enboteligo de minerala akvo. Ĝi komencis sian agadon en 1924, kiam estis popularaj la mineralakvoj Vytautas kaj Birutė. En la sepa jardeko de la 20-a jarcento en Birŝtonas estis konstruita nova entrepreno kun pli potencaj industriaj instalaĵoj. La aŭtentan mineralakvon, nesaturitan je karbonacido, oni povas gustumi en la mineralakvaj trinkejoj de la sanatorioj Tulpè kaj Versmė.

Birŝtonas estas unu el la plej malnovaj kaj belaj banoterapiaj lokoj de Litovio, fama pro reĝfamiliaj radikoj. La bankuracado en Birŝtonas komenciĝis en 1846. Ĉi tiu banloko estas delonge dotita per riĉaĵoj de la naturo: ŝprucantaj mineralakvaj fontoj, kuraca ŝlimo, pura aero kaj salubra klimato. En la banurbo

estas aplikata la lozo o de Sebastian Kneipp. Ĝi baziĝas je kvinelementa sistemo: akva terapio, moviĝ-terapio, kurac-herba terapio, terapio de harmonio, saniga nutrado.

Hodiaŭ la banurbo logas per modernaj kuracejoj, sanatorioj Tulpè (Tulipo), Versmė (Fonto), Eglė (Abio), banloka hotelo Royal Spa Residence, gastamaj hoteloj, restoracioj, ebloj aktive pasigi la tempon kaj memorindaj aranĝoj. Birŝtonas ĉiujare iĝas pli bela – estas rekonstruitaj lignaj konstruaĵoj kaj renovigitaj parkoj, konstruitaj novaj biciklaj vojetoj. En bonegaj, bonakustikaj salonoj okazas altnivelaj koncertoj, kulturaj aranĝoj, festivaloj, estas organizataj artaj ekspozicioj, aranĝoj de subĉiela pentrado.



BET-52 kun aŭspicio de UEA



La Estraro de la Universala Esperanto-Asocio donis sian aŭspicion al BET-52. Per tio UEA esprimis sian apogon al grava internacia aranĝo, kies okazigo konsiderinde servas la celojn de la Asocio. La aŭspicio de UEA estas kvazaŭ signo de kvalito de la aŭspiciata aranĝo. Per sia aŭspicio UEA agnoskas, ke la aranĝo estas prestiĝa kaj altnivela. Kutime estas aŭspiciataj nur la internaciaj esperantistaj aranĝoj kun longa tradicio.

La tradicio de BET naskiĝis kiel Ĉebalta Studenta Esperanto-Tendaro en 1959 kaj daŭras ekde tiam ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio, escepte de du paŭzoj. Komence la partoprenantoj venis el la baltaj respublikoj, sed baldaŭ BET komencis altiri esperantistojn el la tuta Sovetunio. Post la resendependiĝo de la baltaj ŝtatoj BET evoluis al vere internacia renkontiĝo kun riĉa programo. Al BET-52 aliĝis 318 esperantistojn el trideko da landoj. Menciindas, ke UEA aŭspiciis ankaŭ la du pli fruajn BET-ojn, kiuj okazis en Litovio, nome: BET-46 en Visaginas (2010) kaj BET-49 en Utena (2013).

Povilas Jegorovas, prezidanto de LEA



Lerni Esperanton per telefono

La aplikaĵo por lerni Esperanton, kiun la Internacia Esperanto-Instituto en Hago lanĉis post stadio de testado kaj korektado, jam senpage elŝuteblas ĉe Google-butiko (<http://www.play.google.com/>) kaj estas trovebla ankaŭ ĉe pli simpla plusenda adreso: www.iei.nl/apo.htm.

Ĝi estas bazita sur la tre konata Esperanto-kurso "Esperanto per rekta metodo" de Stano Marček (volumo 1, lecionoj 1 ĝis inkl. 11). La volumo 2 estas preparata.

Piet Buijnsters, la programisto, uzis por ĝi la tre trafajn kaj instruajn desegnaĵojn de Linda Marčeková el la kursolibro, kaj kiam oni klakas aŭ tuŝas la tekstojn de la kurso, oni tuj povas aŭdi la klaran prononcadon. La kurso por lerni Esperanton funkcias per bildoj, vortoj kaj frazoj, de simpla al kompleksa strukturo, sen uzi naciajn lingvojn. La gramatikaj reguloj kvazaŭ ludante aperas.

(<http://edukado.net/novajhjoj?id=619>)

Ĉu vi volas kontribui al *Balenido*?

Bonvolu verki kaj meti viajn artikolojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendi ilin rete, se eble kun fotoj, al: stano.marcek@gmail.com

Stano Marček, via redaktoro

Atenton! Korekto!

La prelego de Dima Ŝevĉenko

"Novaj libroj kaj projektoj de la eldonejo Impeto" okazos lunde la 4-an de julio 14.00 – 15.15 en "Birŝtono tulpè" (str. Birutès 21, sur la tria etaĝo).



Multgeneracia Vilaĝo Esperanto en Woodstock

Dum la fama festivalo Woodstock en Kostrzyn, Pollando, kiu okazos jam ĉi-monate (13-16.07.2016, oni atendas 750.000 homojn!) funkcios ĉiutaga informa Esperanto-stando kun broŝuroj, flugfolioj, propagandiloj en diversaj lingvoj pri Esperanto, rektmetodaj kursoj de Esperanto kun Stano Marček, koncerto de JoMo, ekspozicio, vespero pri Bona Espero, kultura programo, diskuttrondoj... Inf.: Centro de Interkultura Edukado Nowy Śącz, Pollando, rete <http://www.cem.info.pl/?p=1505&lang=de>.

Nova fabela libreto de Anna Striganova

Kelkajn tagojn antaŭ BET la eldonejo Impeto aperigis novan libreton, la trian el la serio "Fabelaj Mondoĵ" de Anna Striganova. Ĝia titolo estas "Fabeloj pri malicaj estaĵoj". Dum BET-52 estas premiero de la libro. Kompreneble, ĝi akireblas ĉe la Libro servo. :)

